

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 4

N-ro 2, Majo 1974

Rotterdam

Enhavo	Paĝo
Simone Humm: Edukado en Ĉina Popola Respubliko	53
W. Rabczuk, A. Wenclewski: Evoluo kaj strukturo de instruado en Zairia Respubliko	55
Komparoj inter sveda kaj franca licoj	63
"JUNA AMIKO", Spertoj kaj pensoj de la redaktoro	65
La erarvojoj de IPR	66
Recenzoj	67
Ni ricevis	75

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)

Aperas trifoje jare

en januaro, majo, septembro

Abonprezo 8,- guldenoj, unuopa kajero 3 guldenoj

Redaktoro: Reinhard Haupenthal
Franz-Schubert-Strasse 26
D-6602 Dudweiler

Por ILEI: Helmut Sonnabend
prezidanto de ILEI
Im Eckerkampsfeld 11a
D-3161 Dollbergen

Bankkonto: ILEI - IPR
25.28.71.464-40.
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93

La abonprezon oni pagu nur al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikita bankkonto en Rotterdam.

. . . ni atentigas pri nia averto en la varbnumero de Novembro (p. 4). La origine antaŭviditan temon ("La pedagogia koncepto de Ivan Illich") ni forlasis pro pluraj kaŭzoj: mankis al ni konkretaj kontribuoj; fariĝis jam silente ĉirkaŭ Illich (almenaŭ en la Illich-recepcio de la germana pedagogio); fine, kaj ĉefe, ĉar ni disponis de kelka tempo pri du interesaj kontribuoj, kiuj pravigas nian ŝanĝitan ĉeftemon: Lernejoj sistemoj en ekzemploj. Ili vastigu niajn sciojn kaj horizontojn kaj kunhelpu grandigi la reton de niaj kunlaborantoj, por ke la transmaraj aferoj ne restu ignorataj de nia eŭrocentrismo.

La redaktoro

Edukado en Ĉina Popola Respubliko

De Simone Humm, Avignon, Francujo

La aŭtorino de la ĉi-sekva artikolo estas lernejestrino en Avignon, Francujo. La artikolo baziĝas sur respondoj al demando, kiun la aŭtorino sendis al la redakcio de *El Popola Ĉinio*. La redakcio precizigis, ke "estas necese montri, ke tiuj respondoj temas ĉefe pri la nova instrusistemo prove praktikata en Pekino depost la Granda Proletara Kultura Revolucio. La tuta eduka sistemo de nia lando estas nun en la procezo de reformo, kaj sekve la instru-sistemo priparolita en niaj respondoj povos esti reĝustigita en la venonteco".

Infanĝardenoj

Estas du specoj de infanĝardenoj: ŝtataj kaj popolaj infanĝardenoj. Ĝenerale parolante, infanoj en la aĝo de 3 jaroj kaj duono povas eniri infanĝardenon kaj resti tie ĝis kiam ili transiras al elementaj lernejoj. Depost la Granda Proletara Kultura Revolucio, en parto de infanĝardenoj estas starigita sekcio por suĉinfanoj, kaj tie estas akceptitaj suĉinfanoj en la aĝo de du monatoj. Tio multe faciligas la zorgon de la gepatroj, kiuj ambaŭ laboras dumtage. Plie troviĝas konstantaj kaj provizoraj organizoj starigitaj de la loĝantoj mem en multaj lokoj por prizorgi suĉinfanojn. Kelkfoje la gepatroj komisiis al privata hejmo la vartadon de iliaj suĉinfanoj laŭ interkonsita kompenso.

En la infanĝardeno infanoj restas tuttage aŭ tutsemajne laŭ la postulo de la gepatroj. En infanĝardeno estas malgranda sportejo, ĉambroj por endomaj aktivecoj, dormoĉambroj, lavejoj, kuracejoj, ktp . . . Regule okazas san-ekzameno, kaj oni donas apartan atenton al antaŭgardo kontraŭ malsano. Krom organizi la infanojn por partopreni kulturajn agadojn oni donas al ili ideologian edukon. Ili estas instruataj ami sian socialisman patrujon kaj la vastan labor-popolon, ami labori, ne timi malfacilaĵojn, unuigi kaj interhelpi. Tio estas, ili devas lerni bonajn ecojn de laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj. Ili lernas ankaŭ distingi, kiuj estas amikoj kaj kiuj estas malamikoj. La infanoj lernas ankaŭ kantojn, poemojn, rakontojn . . . kaj samtempe ili lernas plej simplajn ĉinajn ideografiaĵojn, adiciojn kaj substrahojn kun ciferoj malpli ol 20, muzikon, dancon kaj pentradon.

Elementaj kaj mezgradaj lernejoj

Depost la Granda Proletara Kultura Revolucio, en la urbo estas prove enkondukita ĝenerala eduka sistemo de 10 jaroj (kvin jaroj por elementa lernejo kaj kvin jaroj por mezlernejo).

La elementa eduko komenciĝas en la aĝo de ses jaroj kaj duono ĝis sep jaroj. La lernantoj ne bezonas trapasi ekzamenon por eniri en mezlernejo. Ili ĝenerale iras al tiuj mez-lernejoj, kiuj troviĝas proksime de iliaj hejmoj.

La taga horaro por lernantoj de elementaj lernejoj estas 6. En la semajno oni dediĉas: 2 horojn al politiko, 12 horojn al patrino lingvo, 7 horojn al aritmetiko, 2 horojn al revolucia literaturo, kaj 2 horojn al gimnastiko. Ekde la kvara jaro oni aldonas 2 horojn al ĝenerala scio (inkluzive scio pri historio kaj geografio). En parto de elementaj lernejoj estas enkondukita instruado de fremda lingvo po 2 horoj semajne.

Por lernantoj de mez-lernejoj la taga horaro estas sama, kiel en elementa lernejo. En la semajno oni dediĉas: 2 horojn al politiko, 6 horojn al gepatra lingvo, 5-6 horojn al matematiko, 4-5 horojn al fundamenta scio pri industrio (inkluzive scio pri fiziko kaj ĥemio), 2 horojn al scio pri agrikulturo, 2 horojn al historio kaj geografio, 1-2 horojn al scio pri higieno, 4 horojn al fremda lingvo, 2 horojn al gimnastiko kaj 1 horon al revolucia literaturo.

Ĉiujare lernantoj de mez-lernejo iras al fabriko proksime de sia lernejo mem (aŭ fabriko starigita de la mez-lernejo) kaj al la kampara komunumo kaj ili restas tie po unu monato. Tiam ili partoprenas la produktan laboron kaj akiras koncernen scion, sed tio, kion ili devas lerni, estas ĉefe la bona karaktero de la laborista klaso kaj de malriĉaj kamparanoj kaj malsupraj mezkamparanoj. La lernantoj lernas ankaŭ militan aferon dum 20 tagoj ĉiujare, kaj ĉefe la bonan tradicion de Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Ĉiusemajne la lernantoj de la unuaj klasoj de elementa lernejo faras fizikan laboron po 2 horoj, kaj tiuj de pli altaj klasoj po duontago, por ke ili formu ĝustan koncepton pri laborado.

Alterne okazas ekzamenoj, en kiuj lernantoj povas uzi siajn lernolibrojn, notojn, referencan materialon, kaj ekzamenoj, en kiuj estas malpermesate tion fari. La rezultatoj de tiuj ekzamenoj estas demokrate kontrolitaj de la instruistoj kune kun la lernantoj.

Estas vintra kaj somera libertempoj po unu monato, respektive en januaro kaj aŭgusto.

Notu, ke estas malsuperaj kaj superaj mez-lernejoj. En malsuperaj studobjektoj estas malpli multaj kaj pli facilaj ol en la superaj. Lernantoj fininte siajn studojn en malsupera mez-lernejo povas studi en superaj mez-lernejoj.

Mezgrada pedagogia mez-lernejo estas lernejo, kie oni lernas por fariĝi instruisto de elementa lernejo. Tia lernejo akceptas lernantojn, kiuj jam finis siajn studojn en malsupera mez-lernejo, kaj kiuj estas 16-18 jaraĝaj. Dum la periodo de studo en pedagogia mez-lernejo oni instruas metodojn kaj manierojn de instruado.

Instruistoj

La instruistoj de elementaj lernejoj estas ĝenerale diplomitaj de mez-gradaj pedagogiaj lernejoj. Tiuj de mez-lernejoj estas plejparte diplomitoj de universitatoj aŭ fakaj institutoj, tre malgranda parto da ili estas diplomitoj de supera mez-lernejo, kaj poste ili fariĝas instruistoj en sia propra lernejo.

Por la enoficigo de instruistoj oni devas konsideri la nivelon de ilia fako kaj ilia instrua arto, sed oni devas ankaŭ konsideri ilian politikan ideologion, ilian nivelon pri scio de Marksismo-Leninismo kaj Maŭdzedong-penso. Oni devas observi, ĉu ili estas fidelaj al la eduka afero de Komunista Partio de Ĉinio, kaj ĉu ili tutkore kaj tutanime servas al la popolo.

La instruistoj perfektiĝas per reciproka lernado unu de la alia kaj per kolektiva studo kaj esploro. Laŭvice ankaŭ ili iras al fabrikoj kaj kamparo, partoprenas fizikan laboron kaj ricevas reedukon de la laborista klaso.

Supera instruado

Lasttempe la universitatoj ne plu akceptas studentojn rekte el la diplomitoj de mez-lernejoj, sed elstarajn elementojn de laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj, kiuj havas 2-3 jarojn da praktiko en sia propra medio. La aĝa limo estas ĉirkaŭ 20 jaroj, kaj la nivelo de edukiteco egalas tiun de lernantoj de malsuperaj mez-lernejoj. La kandidatoj anoncas sin laŭ sia propra volo aŭ estas elektitaj de siaj kolegoj. Ili devas ricevi permeson de sia gvidinstanco kaj poste la koncerna universitato faras rekontrolon. La studperiodo estas provizore fiksita je 2-3 jaroj.

Evoluo kaj organiza strukturo de instruado en Zairia Respubliko

De W. Rabczuk kaj A. Wenclewski, Lubumbashi, Zairio

W. Rabczuk estas magistro de klasika filologio kaj instruisto de latina lingvo en Ĝenerala Liceo de Lubumbashi. Antaŭe li estis lektoro de latina lingvo ĉe Agronomia Akademio en Varsovio.

A. Wenclewski estas doktoro de natursciencoj kaj ekde 1969 ordinaria profesoro de biokemio ĉe Nacia Universitato de Zairio. Antaŭe li estis lektoro de Esperanto ĉe Supera Ekonomia Lernejo en Poznan, Polujo.

La Dua Mondmilito kreis veran returnpunkton en la historio de la koloniaj landoj de Nigra Afriko. Dum apenaŭ kvarono de jarcento la kontinento ŝanĝis radikale sian aspekton; sur ruboj de pasintaj koloniaj imperioj ekstaras sendependaj afrikaj ŝtatoj.

Unu el la komunaj ecoj de tiuj ĉi landoj, post atingo de la sendependeco, estis ega malprogreso de klerigado kaj arda problemoj de instrusistemreformo.

Zairio, antaŭa belga kolonio, atingis sendependecon je 1960-06-30. La lando, kies surfaco egalas 2.345.000 km², estas kvarfoje pli granda ol Francujo kaj okdekfoje pli granda ol sia antaŭa mastro, Belgujo. En Afriko laŭ la teritorio ĝin superas nur Sudano kaj Alĝerio.

Dudekunumiliona popolo, apartenanta al tre diversaj etnaj grupoj, parolas ĉirkaŭ 250 dialektojn, inter kiuj la plej grandan atingokapablon posedas: „Kikongo, Lingala, Tshiluba kaj (Ki)Swahili“, kiel oficiala lingvo ekzistas la franca.

Ŝajnas, ke trastudado, almenaŭ en supraĵa resumo, de la edukadevoluo dum la kolonia periodo permesos pli facile ekvidi la transformiĝojn, kiuj efektiviĝis kaj efektiviĝas en la instrusistemo de sendependa Zairio.

Eŭropa klerigadkomenco en iama Kongo datas ekde la jaro 1890, kiam la belga reĝo Leopoldo II rekomendis al sia administracio en Kongo organizi orfejojn. La edukado en supre menciitaj orfejoj, nomitaj „infankolonioj“, havis profesian kaj militistan karakteron. Ilia celo estis prepari venontajn soldatojn kaj kvalifikitajn laboristojn. Ŝtata kuratelo de tiuj infanoj daŭris ĝis la 25-a vivjaro.

En la jaro 1892 religiaj misioj ricevis rajtigojn por fondi orfejojn de agromonia kaj profesia tendencoj.

Alia formo de kleriga agado de la monaĥaro dum tiu ĉi tempo estis tiel nomataj farmdomo-preĝejoj, malgrandaj vilaĝaj centroj, situitaj malproksime de pagana medio, grupigitaj po 10-15 junajn indiĝenojn. Instruado en

tiuj ĉi centroj, gvidataj ĝenerale de kongaj katekistoj, enhavis: kateĥismon, skrib- kaj legadbazojn, gvideojn pri agronomio kaj kulturado.

En 1906, rezulte de kreskanta bezono je kvalifikitaj laboristoj kaj metiistoj, ekstaras unuaj lernejoj de profesia preparo. Sed tiu ĉi jaro estas karakteriza ankaŭ pro aliaj kaŭzoj: je 1906-05-26 Leopoldo II kontraktis konkordaton kun Vatikano. La interkonsento ekkomencis evoluon de katolikaj misioj en Kongo kaj ilian monopolon en klerigadfako.

Konforme al la decido de supre menciita konkordato, la belga reĝo devigis sin senpage destini grundojn al katolikaj misioj, kaj la misioj devontigis sin rekompence fondi kaj establi lernejojn por konganoj.

La jaro 1910 fariĝis plua paŝo por fiksi en Belga Kongo religian instruadon: la kolonia registaro transdonis al katolikaj misioj ĝiajn orfejojn, kaj la profesiajn lernejojn al katolikaj kongregacioj.

La monopolon de katolikaj misioj en la klerigado eksankciis finfine lernejaĵaj reguloj de 1924, atribuintaj rajton al subvencioj de la registaro ekskluzive al lernejoj gvidataj de naciaj, belgaj misioj. Eksterlandaj misioj, same protestantaj kiel katolikaj, ne povis profiti de tiuj registaraj subvencioj ĝis la jaro 1945.

Sendube, ke la materiala aspekto devigis Belgujon por subteno kaj favorado de religia klerigado en la kolonio: tiu ĉi politiko permesas disvolvigon de multnombraj lernejoj sen pli grandaj financaj elspezoj flanke de la kolonia registaro. Tamen la ĉefa kaŭzo estis alia: Belgujo konfidis la taskon konverti la indiĝenojn kaj la gvidadon de lernejoj al belgaj misioj, kiuj praktike ĉiuj estis katolikaj, supozante, ke nur la naciaj misioj povas certigi edukadon de konganoj en vera lojaleco.

Ĝis la jaro 1945 la klerigado en Kongo estis praktike reduktita je la popol-lernejoj. Instruado okazadis ĉefe en indiĝenaj dialektoj, kaj ĝi estis limigita je legad- kaj skriblernado, de fundamentaj aritmetikaj operacioj, kateĥismo kaj je respektinspiro kaj simpatio al koloniistoj. La ĉefa akcento tamen baziĝis sur religia edukado.

Studado de franca lingvo ampleksis nur malmultan procenton de la infanoj, en tiel nomataj "postpopollernejoj", kies praktika celo estis: bezon- satigi privatajn kompaniojn kaj administracion je kvalifikitaj laboristoj, helpa personaro por oficejoj, sanitara servo k.t.p.

La instruado pri humanisma tendenco estis realigata en malgrandaj pastraj seminarioj, kiuj karakteriziĝis bedaŭrinde per troa simpligo de programoj. En konsekvenco, manko de laikaj linceoj devigis la instruiĝeman junularon daŭrigi la studadon je supera nivelo, en tiuj seminarioj. Poste, ricevinte kontentigajn laborkondiĉojn en ŝtata aŭ privata sektoro, ili forlasis ĝin.

Nur malgranda procento ampleksis klerigadon de knabinoj. Tamen la aliigoj ekestintaj post la Dua Mondmilito, devigis Belgujon entrepreni certajn edukadreformojn en la kolonio.

En la jaro 1946 la kolonia registaro destinis subvenciojn al lernejoj administrataj per eksterlandaj misioj. Ekestis ankaŭ unuaj laikaj lernejoj por Eŭropanoj, loĝantaj en Kongo por kiuj baldaŭ duonnegroj ricevas partopren-rajton. En 1948 oni fondis unuajn humanismajn religiajn linceojn, en kiuj la franca lingvo estiĝas instrulingvo. Bedaŭrinde la diplomoj de supre cititaj linceoj ne estis egalvaloraj al diplomoj de belgaj lernejoj, kaj neniu kongano, abituriendo de mezgrada lernejo en la kolonio, povis eniri iun universitatan en Belgujo.

Timemaj, preventaj rimedoj kontraŭ tiu rasdiskriminacio en la edukado estis entreprenitaj en la jaro 1952, ĉar dum lernejjaro 1952/53 unuaj konganoj ricevis frekventpermeson por eŭropaj lernejoj en Kongo, rezervitaj ĝis nun ekskluzive por infanoj de koloniistoj.

La jaro 1954/55 inaŭguris en ĉefaj urboj de la lando naciajn laikajn lernejojn por konganoj, forigante tiamaniere la monopolon de katolikaj misioj en instruado. Kun la kreado de laikaj lernejoj por indiĝenoj, oni enkondukis al

la lernejaroj oficialajn belgajn instruprogramojn.

Fine, la leĝo de 1959-07-14 rekonis egalvaloron de kongaj linceo-finatestoj kun konvenaj atestoj de belgaj lernejoj.

La ideo krei superan edukadon por indiĝenoj faris vojon kun grandaj mal-facilaĵoj, renkontigante kontraŭstaron flanke de la registaro, de koloniaj teoriistoj, de parto de pastraro kaj instruistaro.

La principa kaŭzo de tiuj kontraŭstaroj estis timo, ke la estonta, konga inteligentularo ne levu kritikon de kolonia sistemo kaj por ke ili ne komencu postuli la sendependecon de la lando.

Tamen en la jaro 1952 la belga registaro estis devigata de la komisiono de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj krei unuversitatan instruadon en kolonio, pro tio en la jaro 1954 oni fondis Katolikan Universitaton "Lovanium" en Leopoldville (nun Kinŝasa), kaj du jarojn pli malfrue Oficialan Universitaton de Kongo kaj Ruando-Urudio en Elisabethville (hodiaŭ Lubumbashi). Dum la kolonia periodo, t.e. ĝis la jaro 1960, la universitatoj estis pli belgaj ol kongaj; ekzemple en akademia jaro 1957/58 en la Oficiala Universitato de Kongo en Lubumbashi estis enskribitaj 146 gestudentoj, inter kiuj apenaŭ 18 estis indiĝenoj.

Kiam Francujo kaj Britujo jam dum multaj jaroj klerigis multnombrajn afrikanojn kiel stipendiulojn en siaj universitatoj kaj en aliaj superaj lernejoj de metropoloj, Belgujo malkontente vidis studentojn aŭ praktikantojn el Afriko en sia lando; ekzemple en la jaro 1956 en Belgujo estis nur 15 laikaj stipendiuloj el Kongo, kaj dum la sama periodo en Francujo klerigis ĉ. 1300 gestudentoj nur el Okcidenta Afriko.

Du jarojn antaŭ la sendependeco (1957/58), la klerigadstato en Kongo estis jena:

Tab. 1. Edukadstato en antaŭ-, popol- kaj postpopollernejoj

Loĝantaro de la lando	13.559.000	100%
Lernantaro en ĉiuj lernejoj	1.533.314	11,3
Infanoj en antaŭlernejoj	48.686	3
Junularo en popollernejoj	1.421.079	93
Junularo en postpopollernejoj	63.549	4

en tio en faklernejoj estis 19.643 gelernantoj (1,2%).

Supozante, ke la junularo de lernejaĝo formas normale ĉ. 20% de homaro (laŭ UNESKO), en Kongo dum la jaro 1958 la procento de lernantaro estis 56,5, starigante la landon je tria loko inter la afrikaj landoj, post Rodezio-Niaso (nun Malavio) kaj Gano.

La sendependeco de Konga Respubliko kreis kondiĉojn por enkonduki kvalitatajn kaj kiomecajn modifojn en ĝisnuna edukadsistemo.

Konstitucioj de 1964 kaj 1967 jaroj garantiis klerigadrajton kaj senpagan publikan edukadon por ĉiuj konganoj. Aprobante la principon de instruad-libereco, transprenitan de kolonia leĝdonado, la konstitucio de sendependa Kongo enkondukis tamen koncepton de nacia edukado, kiu ampleksas samtempe lernejojn organizitajn de la ŝtato, kaj ankaŭ organizitajn de privataj personoj aŭ asocioj aprobitaj de la ŝtato kaj submetitaj je ĝia kontrolo kaj ĝiaj direktivoj. Nacia edukado, do lernejoj naciaj kaj religiaj kiel: katolikaj,

protestantaj kaj kimbangistaj (1) estis financitaj el ŝtata buĝeto kaj gvidis sian agadon en la kadro de principo de ŝtata klerigadpolitiko.

Ĝia klasifiko, bazita je la statistiko de la jaro 1968/69, prezentas sin jene:

Tab. 2. Klasifiko de religiaj lernejoj

Lernejkategorio	procento de gelernantoj en:	
	popollernejoj	mezlernejoj
Naciaj	12,2	34,9
Kongregaciaj	0,5	3,4
Katolikaj	63,3	33,9
Protestantaj	17,8	10,7
Kimbangistaj	6,2	7,7
kaj aliaj	---	9,4

En popollernejoj estis enskribitaj 2.564.845 gelernantoj el kiuj 902.567 estis knabinoj (35,2%). Mezlernejoj enhavis 222.196 gelernantojn, el kiuj 43.080 estis knabinoj (19,4%). (2).

El leĝa vidpunkto oni trovas nun en Zairio jenan edukadstrukturon:

1. Naciaj lernejoj
2. Lernejoj aprobitaj kaj subvenciataj de la ŝtato; la aprobo baziĝas sur ŝtata rekono de studoj kaj atestoj aŭ diplomoj eldonitaj per lernejo, sur principo de preciza kontrolo administracia kaj pedagogia. Preskaŭ ĉiuj lernejoj katolikaj, protestantaj kaj kimbangistaj apartenas al tiu ĉi kategorio.
3. Lernejoj aprobitaj sed nesubvenciataj de la ŝtato; ekzemple malgrandaj seminarioj, kies lernantoj povas fari ŝtatan ekzamenon, konfirmanta finon de mezlernejo.
4. Ŝtataj lernejoj de kongregacioj; funkcias ankoraŭ kelkaj popollernejoj kaj mezlernejoj kreitaj jam per kolonia registaro kaj konfiditaj ekde 1910 al religiaj kongregacioj. La ŝtato kovras koston de vivteno kaj de funkciado.
5. Privataj lernejoj.
6. Lernejoj de industriaj asocioj.

Atestoj donitaj de la du lastaj kategorioj (5 kaj 6) ne estas rekonataj de la ŝtato kaj ili ne rajtigas al laborpretendo en ŝtata sektoro.

En la jaro 1962 okazis reformo de popollernejaroj, egaliganta la strukturon kaj la programojn por certigi egalvalorajn diplomojn por knaboj kaj knabinoj, por ĉiuj provincoj kaj por ĉiuj lernejoj de la lando. De tiu ĉi tempo la instruado estas sesjara kaj partiĝas je tri dujaraj etapoj. Al popollernejo oni akceptas knabojn de aĝo 6 ĝis 8 jaroj kaj knabinojn 9-jaraĝajn. Finatesto de seso klaso de popollernejo donas rajton por sekvi unuan klason de tiel nomata "orientiga ciklo" aŭ iun profesian lernejon.

Profesiaj lernejoj estas du- aŭ trijaraj. Ili konsistas el jenaj lernejtipoj: dommastrumado, tajlorado kaj kudro por knabinoj, metiistaj tipoj k.a. La pliparto de profesiaj lernejoj tamen estas pedagogiaj lernejoj de mastrumado

- (1) Konfesantoj de nova kristana religio, kreita per profeto Simon Kimbangu en Belga Kongo en 1921.
- (2) *Annuaire statistique de l'Education 1968/69*, STA 19, R.D.C., Ministère de l'Education Nationale, Kinshasa, 1971.

kiuj formas ĉ. 30% de ĉiuj lernejoj de tiu ĉi tipo. Metiistaj lernejoj formas ĉ. 29% kaj ili posedas jenajn sekciojn: elektran, radian, meblistan metion, mekanikan ĝeneralan, mekanikan aŭtomobilan, masonistan, agronomian, botistan k.t.p.

Estas tre karakteriza afero, ke en profesia edukado oni posedas ĝis 74,4% da knabinoj.

Dujara orientiga ciklo evitas ĉiun antaŭtempnan specialigon; fininto de tiu ĉi ciklo ricevas atestojn kun rimarko tiel nomata "avis d'orientation" – konsilo rilate al la elekto de studdirekto, kiu estas singardema antaŭvido de la ŝanco de lernanto en difina lernejtipo. Orientiga ciklo, kiel unua etapo de mezdukado, realigas samspecan programon, faras komunan bazon por specialistaj sekcioj de la tuta mezdukado. Tiu ĉi ciklo konatigas gelernantojn kun metodoj kaj formoj de pli abstrakta penso, karakteriza por la mezinstruado.

Mezlernejoj donas du lerneblecojn: en 4-jara aŭ en 3-jara mezlernejo. Tio, kio distingas tiujn ĉi du tipojn, estas iliaj celoj kaj karaktero. Instruado en lernejoj je mallonga ciklo havas profesian kaj praktikan karakteron, dume lernejoj je longa ciklo donas edukadon ĝeneralan kaj teorian.

Trijaraj mezlernejoj profesiaj posedas jenajn sekciojn: mekanikan, elektroteknikan, agronomian, komercan, pedagogian (preparado de geinstruistoj por popollernejoj) kaj fakojn rezervitajn ekskluzive por knabinoj, nome: sekcio socialfamilia kaj sekcio de tajlorado kaj kudro.

Komplekso de ĉi tiuj sekcioj preparas malsuperajn kadrojn por diversaj ekonomiaj fakoj. Finatesto ebligas tujan laborakcepton, konforme al akiritaj kvalifikoj.

Kvarjaraj mezlernejoj similas iomete al tradiciaj sekcioj de mezdukado dum la lastaj jaroj antaŭ sendependeco, kaj ili dividiĝas je sekcioj: literatura, ekzakta sciencoj, teknikaj kaj pedagogiaj. Ekzakta direkto konsistas el du subsekcioj: matematik-fizika kaj kemi-biologia; teknika sekcio posedas jenajn subsekciojn: administraci-komercan, mekanikan, arkitekturan, agronomian, belartan k.t.p.; pedagogio enhavas du subsekciojn: de ĝenerala pedagogio kaj korpa edukado. Ĉiuj kvarjaraj mezlernejoj, tiuj de teknika direkto kaj same de ĝenerala edukado, post matureca ekzameno donas rajton por komenci universitatajn studojn.

Pritakssistemo en mezlernejoj estas jena: respondoj, domtaskoj kaj lernejtaskoj estas pritaksitaj ĝenerale en skalo 1:10 (universitato 1:20). Ĉar lernoj konsistas el kvar periodoj (du semestroj), lernanto estas en alia klaso por ĉiu periodo. Maksimumo da punktoj por ĉiu lernanto dum tuta periodo oscilas depende de la studobjekto de 20 (religio) ĝis 50 (franca lingvo). Post unua kaj dua semestroj la gelernantoj trapasas skriban ekzamenon de ĉiuj instruobjektoj. Ekzamenpritakso kun ĉiuj periodpritaksoj faras la bazon por semestra pritakso. Lernanto, kiu ricevis malpli ol 45% da punktoj de ĉiuj instruobjektoj dum unua kaj dua semestro, ne ricevas promocion al pli alta klaso. Lernanto, kiu ricevis 45–50% da punktoj por ambaŭ semestroj, sed malpli ol 50% de kelkaj instruobjektoj, povas trapasi korektan ekzamenon en aŭtuna kunsido, ricevinte pozitivajn rezultojn li estas promovita al sekvonta klaso. Ricevo de minimume 50% da punktoj je la fino de lernejjaro kiel mezvaloro de ĉiuj instruobjektoj kaj de ĉiu studobjekto aparte rajtigas al aŭtomata promocio je supera klaso.

Post atingo de la sendependeco en Kongo oni fondis aron da superaj lernejoj kaj Protestantan Universitaton en Stanleyville (nun Kisangani). Tiamaniere ĝis oktobro 1971 funkciis tri universitatoj: Katolika Universitato "Lovanium" en Kinshasa, Oficiala Universitato de Kongo en Lubumbashi kaj Libera Universitato de Kongo en Kisangani (3), kaj ĉirkaŭ 18 superaj lernejoj de tipo: pedagogia, administracia, teknika, artista kaj similaj. Ĉiu supera lernejo kaj ĉiu universitato posedis vastan aŭtonomion. En aŭgusto 1971 per prezidenta

- (3) U.L.C. estis protestanta universitato

dekreto, okazis unuigo de ekzistantaj tri universitatoj kaj de iuj superaj institutoj, kiuj de tiu ĉi momento estis subordigitaj al unu rektoro kaj al unu Administracia Konsilo.

Je fundamento de reorganizo de superaj lernejoj estis motivoj politikaj, pedagogiaj kaj financaj. Universitatoj Katolika kaj Protestanta elmontris fortan dependecon de antaŭaj religiaj institucioj eksterlandaj, kiuj kreis ilin. Ĉi tiea partio M.P.R. (Popola Movado de Revolucio) decidis plifortigi kontrolon de la universitatagado. La Diplomoj de supre menciitaj universitatoj ne estis traktitaj kiel egalrajtaj pro diferenco de programoj. Krom tio kreado de paralelaj fakultatoj, ofte por malmultnombraj kandidatoj, kaŭzis senutilajn kaj rimarkeblajn elspezojn.

Kiel oni jam menciis, Nacia Universitato de Zairo (UNAZA) estas direktata per Administracia Konsilo (9 membroj), estrata de rektoro kaj anstataŭanta prorektoro.

Ekzistantaj tri Universitataj Centroj en Kinshasa (7), Kisangani (5) kaj en Lubumbashi (5) (4) estas direktataj laŭvice de Direktora Komitato, estrataj de vic-rektoroj.

Estrecon en 11 Superaj Pedagogiaj Institutoj (5) plenumas Ĝeneralaj Konsiloj de Superaj Institutoj kun siaj Direktoroj.

Tri unujaraj Preuniversitataj Centroj en Mbandaka, Bukavu kaj Kananga estas administrataj de siaj direktoroj.

Iafoje fakultatoj de UNAZA konsistas el departamentoj, malofte el komisionoj. La fakultato estas administrata de fakultatoficejo kun dekanato, vicdekanato kaj sekretario.

Studento povas komenci sian studadon prezentante diplomon de mezlernejo kaj ekde la jaro 1973/74 post trapaso de orientiga ekzameno.

Nur por la politekniko, fiziko kaj matematiko (IPM) oni estas devigata trapasi enirekzamenon. Ĉiuj gestudentoj de la unua jaro prezentas post tri monatoj kontrolekzamenon; personoj kiuj gajnis malpli ol 25% (6) da punktoj estas forstrekigitaj. Ĝenerale studoj konsistas el tri cikloj: I - "graduat" donas diplomon post 2- aŭ 3-jaraj studoj, je la bazo de finstuda verko; II - "licence" donas diplomon post denovaj du- aŭ tri-jaraj studoj, post prezento de tiel nomata memorigaĵo (memoire). Ekzistas kvar kategorioj de diplomoj:

- a) "licencié" en sciencoj . . . (ekz. botanikaj), studperiodo 2 + 2 jaroj
- b) Inĝeniero de Agronomio studperiodo 2 + 3 jaroj
- Inĝeniero diplomita (ingenieur civil) studperiodo 2 + 3 jaroj
- c) Farmaciisto studperiodo 2 + 3 jaroj
- d) Doktoro de Veterinara Medicino studperiodo 3 + 3 jaroj
- Doktoro de Homa Medicino studperiodo 3 + 4 jaroj

Preskaŭ ĉiuj diplomitoj de unua grupo (licencié) faras aldonajn ekzamenojn rajtigantaj je instruado en superaj klasoj de mezlernejoj. III-doktoreco, titolo ricevita post prezento de speciala tezo, farita post normalaj studoj (post diplomo).

Tre malofte oni faras docentecon tiel nomatan "agregation de l'enseignement superieur".

Superaj Pedagogiaj Lernejoj (IPN kaj ISP) posedas 5-jaran ciklon dum kiu oni preparas kvalifikan kadron de instruistoj; ricevita titolo: "Agrége en enseignement" - profesoro aŭ instruarajtigito.

Pedagogiaj Duonsuperaj Lernejoj (ENM) post 3-jara studado donas titolon: "Gradué en enseignement" - fakinstruisto.

Trijaraj Teknikaj Institutoj ankaŭ duonsuperaj, donas titolon: teknika inĝeniero.

- (4) en parantezoj - nombro de fakultatoj
- (5) 1-IPN, 1-ISP kaj 9-ENM
- (6) Ekde la jaro 1973/74 - 30%

Ekzistas kvin gradoj de universitata instrupersonaro, kiun ni prezentas en la tabelo no. 3.

Tab. 3 - Akademia kaj scienca personaro.

	minimumaj:		Laborhoroj
	laborperiodo	publikaĵoj	
Asistanto	3	2	450
Adjunkto	2	2	450
	DOKTORECO		
Profesoro asistanto	1	+	180-270
Profesoro	4	+	180-270
Profesoro ordinara	senlima	+	180-270

Dum la jaro 1971/72 ankoraŭ 70% de la profesoroj estis eksterlandanoj (el 24 landoj).

Karakteriza estas la proporcio de gestudentoj enskribitaj en humanismaj sciencoj rilate al ekzaktaj sciencoj, ĝi estas kiel 5:2. Kiel ekzemplo ni citos la ciferojn de la jaro 1972/73 por Universitata Centro en Lubumbashi:

Fakultato de Sociologio, Administracio kaj Politikaj Sciencoj	1200
Fakultato Humanisma	800
Fakultato de Ekzaktaj Sciencoj	350
Fakultato de Politekniko	300
Fakultato de Veterinara Medicino	300

Ekde la jaro 1960 oni observas en la sendependa lando subitan kreskadon de lernantnombro en ĉiuj stadioj de edukado. Por ilustri tiun fenomenon ni citas kelkajn ciferojn, ĉerpitajn el oficialaj statistikoj. Paranteze oni devas rimarkigi, ke enkonduko de deviga instruado en Zairo estas antaŭdata por la jaro 1980.

Tab. 4 - Evoluo de edukado laŭ la nombro de gelernantoj

Jaro	Popollernejoj	Mezlernejoj	Superaj Lernejoj	
			neuniversit.	universit.
1957/58	1.421.079	43.906	550	
1961/62	1.054.626	49.152	455	924
1962/63	1.804.967	68.350	752	1.234
1963/64	1.995.230	92.273	1.064	1.527
1964/65	1.610.159	92.069	1.137	1.838
1965/66	2.066.809	121.232	1.410	2.447
1966/67	2.193.200	141.220	1.683	3.133
1967/68	2.338.895	164.078	2.336	3.554
1968/69	2.666.034	201.245	2.882	5.846
1969/70	2.801.340	210.452	4.059	6.153
1970/71	2.970.039	223.269	4.209	8.200
1971/72			4.552	10.445
1972/73	mankas oficialaj statistikoj		5.517	10.952

Tiu ĉi situacio estas konfirmo de forto kaj samtempe de malforto de la aktuala klerigadsistemo en Zairo: de forto, ĉar ĝi atestas pri dinamiko de ĉiuj edukadtipoj; de malforto, ĉar tiun rapidan kreskon de nombro ne akompanas konvena, solida, relative kvanta kaj kvalita garantio sub formo de instruista kadro, lernejoj, didaktikaj materialoj k.t.p. Rapida kaj subita progreso de mezinstruado en ĉi tiuj kondiĉoj kaj en malfacila iam situacio socio-politika kaŭzis malaltigon de instrunivelo en iuj lernejoj. Oni ne miras, ke Ministerio de Nacia Edukado aplikas ĉiuspecajn rimedojn por revalorigi mezinstruadon, malpermesante krei novajn klasojn de orientiga ciklo kaj novajn sekciojn en ŝtata kaj subvenciita mezinstruado, plialtigante sisteme buĝeton destinitan por edukado (rig. fig. no. 2).



Fig. 2 Sumoj por la edukado prezentitaj en procentoj de la nacia buĝeto (laŭ *Profils du Zaire* 1971, p. 410).

Karakteriza estas manko de ekvilibro inter apartaj lernejtipoj: pli ol 90% de la lernantaro vizitas popollernejojn, sed la proporcio de gelernantoj finintaj tiujn ĉi lernejojn, estas relative malgranda. El tri finintoj nur unu vizitas unuan klason de orientiga ciklo. Dum ĉiu edukadgrado oni observas tre grandajn perdojn, ekzemple el 1000 gelernantoj de popollernejo nur 154 (15,4%) atingas sesan klason, do dum la 5 jaroj malprofito estas ĉ. 85%. Nur 38 lernantoj (27,4%) el 154 finas la sesan klason sen malfacilaĵoj.

En mezlernejoj ekde la komenco de la jaro 1961 ĝis ricevo de diplomoj en la jaro 1967, malprofito egalas 91%. Por lernantoj enskribitaj en la jaro 1962 la malprofito estis 94%. Por la pliparto de junularo kiu malsukcesis estas malfacile envicigi al la tradicia vivo de la socio, kiu restas ankoraŭ ĉiam agrikultura. Pro tio oni observas en Zairo, kiel en aliaj afrikaj landoj, la tendencojn por ellabori novan lernejsistemon, kiu ne deturnus la lernanton de lia medio kaj kiu preparus lin por eniĝi al la laboro de afrika socio.

Afrikigo de klerigado estas unu el la fundamentaj problemoj kiuj aperis por junaj landoj de Nigra Kontinento. Ja klerigadsistemo en koloniaj landoj estis reproduktado de malnovaj programoj de mastrolandoj, kiuj eĉ en metropoloj postulis iam esencajn modifojn. Ili ne estis konvenaj al la afrika realeco dum la kolonia periodo, tiom malpli al la realeco de novstarigitaj sendependaj landoj. Neafrikaj, modeligitaj el Eŭropo programoj ne permesis senĝene

disvolvi inteligentecojn, organizadsenton kaj produktivan infanimagon. Dum la kolonia epoko gelernantoj pli bone konis belgan historion ol zairan. En multaj landoj de eks-franca Afriko, same en Zairo, ankoraŭ en la jaro 1960 nacia historio ne estis lekciita en iu ajn stadio de mezlernejo. Lernolibroj estis regule apartigitaj de la afrika realeco.

Por ke la personeco de la lernanto povu disvolviĝi harmonie, oni devis likvidi abismon inter la ĉiutaga vivo kaj la lernejo. Novaj programoj kaj lernolibroj, enkondukitaj en zairaj lernejoj klopodas kompletigi tiun mankon. Oni observas tion precipe en jenaj studobjektoj: historio, geografio kaj natursciencoj.

Afrikigo de klerigado ne estas ebla sen afrikigo de la instrukadroj. Sur tiu ĉi kampo restas ankoraŭ multe por plenumi. En la jaro 1968/69 zairanoj formis apenaŭ 54% de instrupersonaro, kaj en superaj lernejoj nur 25%, inter kiuj plejparte estas asistantoj. Do oni estas devigata profiti en vasta amplekso de helpo de eksterlandaj profesoroj ĉefe belgoj, francoj kaj aliaj. Dum la jaro 1972/73 nur en la Universitata Centro de Lubumbashi troviĝas profesoroj el 23 landoj.

Konfirmo de afrikana personeco, deziro efektiviĝi mensan senkoloniigon kaŭzis bezonon por eltrovo de kultura heredaĵo de Afriko. Zairo kondukas revivigan bataladon por tiel nomata aŭtentiko, kiun oni povas determini kiel kultpolitikon de kongaj tradicioj, kiel reakcion je elnaturigo de zaira kulturo kaj pereigon per ĝi de sia originala vizaĝo dum la kolonia periodo.

Komparoj inter sveda kaj franca liceoj

Informoj kolektitaj de J. Guillaume, Francujo

	FRANCA	SVEDA
Direkcio	1 direktoro	1 rektoro
Lernantoj	500	500
Aĝo	11 ĝis 16 jaraĝaj	13 ĝis 16 jaraĝaj
Nombro de instruist. 30		40
INSTRUADO	Franca lingvo: en unuaj klasoj: 6 h. poste 4 h. semajne	Sveda lingvo: 3-4 h. semajne
	Matematiko: 5 poste 4 h. semajne	4 h. semajne
	1-a lingvo, angla aŭ germana post la 11-a jaraĝo	B-lingvo: germana aŭ franca post 13-a jaraĝo
	2-a lingvo (diversa laŭ la regiono) post 13 jaraĝo	
	Scienco: 1 h. semajne	Biologio, kemio, fiziko 5 h. semajne
	Desegno: 2 h. semajne	2 h. semajne
	Muziko: 1 h. semajne	1 h. semajne
	Manlaboro: 1 h. kaj 1/2	4 h. semajne
	Historio: 1 h. semajne	1-2 h. semajne
	Geografio: 1 h. semajne	1-2 h. semajne
	Civitana instruado: 1 h. semajne	1-2 h. semajne

	Sporto: 1 h. 1/2	3 h. semajne
	(oficiale: 5 h.)	
Lernantoj en klaso:	oficiale: 35 sed ĝis 40	20 -maksimume: 25
Laborhoroj de la instruisto:	agregaciulo: 16 h.	Licea adjunkto-profesia profesoro: 30 h. semajne
	profesoro: 18 ĝis 21 h.	
Salajroj monate:	komence 1400 Fr.	komence: 3000 Fr.
	fine 5000 (maksim.)	fine: 4600 Fr.
Jara laboro:	186 tagoj (merkrede kaj sabate posttagmeze nenia laboro)	190 tagoj (liberaj sabatoj)
Taga lernado:	4 h. matene + 3 h. posttagmeze	Lernantoj: 35 h. semajne
Manĝo:	1 h. 1/2	1 h.
Kosto de manĝo	4 aŭ 5 Fr.	senpage
Daŭro de leciono:	1 h. (inkluzive ĉambro-ŝanĝon)	40 minutojn
Paŭzoj:	10 minutoj post 2 horoj	10 minutoj post ĉiu leciono
Rimarkoj: Svedujo:	En la 8-a kursjaro: tri studvizitoj unutagej en diversaj laborejoj aŭ fabrikoj. La lernejo pagas la koston. En 9-a kursjaro: du semajnojn praktika profesiorientado. La lernejo pagas la koston ĝis ia limo. (Ekz. al Öland, Karlskrona, Stokholmo-Operdomo.) En iaj kazoj 14-jara lernanto laboras 4 tagojn dum la semajno en laborloko elektita de la lernejo. Nur unu tagon de la semajno li estas en la lernejo.	
Francujo:	De 6 monatoj okazis ŝanĝo de la programoj. La ministro decidis, ke 10% de la programita tempo estos libere elektita de la instruistoj kaj de la gelernantoj. Jen kelkaj temoj elekteblaj: <ul style="list-style-type: none"> - Vizito de fabrikoj, muzeoj, kinoj, teatroj. - Studado pri kuirarto, spiritismo, gastronomio, arkeologio, foto, ĵurnalismo, grafologio, infankulturo (kun buboj), medicino, ktp . . . En la kadro de tiuj 10 % profesoro povas aranĝi eksteran viziton, kiu povas daŭri unu tagon aŭ unu semajnon. La gepatroj pagas la elspezojn. La sukceso de tiu provo ne estas kontentiga: 1/3 entuziasme kunlaboras, alia 1/3 interesiĝas, sed la lasta triono faras nenion. Kelkaj instruistoj rifuzas la provon. Manko de mono por aĉeti materialon malfaciligas la aferon. Nova decido: Ekde januaro 14-jaraj lernantoj rajtos forlasi la lernejon por lerni metion dum du jaroj ĉe metiisto aŭ en fabriko.	

"JUNA AMIKO"

Spertoj kaj pensoj de la redaktoro

Post unujara redaktado de *Juna Amiko* mi povas resumi la spertojn kaj montri kelkajn specialajn trajtojn de nia revueto.

Ĉu estas necese ekspliki la gravecon de didaktike redaktataj periodaĵoj en la lingvoinstruado? Tuterne ne. Amaso da naciaj eldonaĵoj por lernejoj deziras helpi la fremdlingvan instruadon, kaj ili havas vastan legantaron eĉ inter plenaĝuloj.

Kiajn principojn havas tiuj naciaj periodaĵoj?

1. Ili kontribuas al *lingva perfektigo* de la celata aĝogrupa. Kun tia celo estas aperigataj:

a) modelaj, lingve senriproĉaj tekstoj;

b) simplaj aŭ, se necese, lingve simpligitaj legaĵoj, sekve leksemoj, ne apartenantaj al la baza vortrezoro de la koncernaj lernolibroj, estas piednotataj;

c) ludoj, enigmoj ktp. por lingve aktivigi la lernantojn.

2. Ili prenas sur sin ankaŭ gravan *ideologian taskon*. Por tio estas prezentataj:

a) naturbelaĵoj, ekonomia kaj politika vivoj en la koncerna lingvolando;

b) elstaraj reprezentantoj de la kultura kaj scienca vivoj kun fragmentoj el la nacia literaturo.

3. El aparta konsidero al la *lingvosocio kaj aĝo* de adoleskantoj sekvas jenaj proprecoj:

a) nur mallongaj tekstoj estas publikigeblaj, pli ol iom longaj povas aperi nur en daŭrigoj;

b) por kateni la atenton oni preferas legaĵojn ekstreme allogajn, beletraĵojn romantike pintigitajn;

c) por vigligi kaj faciligi la lernadon unuarangan signifon havas la tipografia kaj grafika aspektoj.

Jen estas almenaŭ en ĉefaj linioj la plej karakterizaj trajtoj de la naciaj fremdlingvaj eldonaĵoj por la lernantaro.

Ĉu ni devas ilin imiti senkritike?

En nia historio oftis provoj simple kopii naciajn periodaĵojn. Tiaj klopodoj estis kaj restas por ĉiam morte naskitaj en esperanto el du gravaj kaŭzoj: (a) redakcioj de tiaj gazetoj ŝajnas tute forgesi pri la plej karakteriza trajto de esperanto, nome pri ĝia epiteto: *internacia*; (b) malalta eldonkvanto ne ebligas kontentigi la ekstreme gravan postulon 3. b)

Elirante el tio, ke esperanto estas ne simple lingvo, sed *speciala* lingvo, oni tuj rimarkas ke nia lerneja periodaĵo devas grave diverĝi de la naciaj similaĵoj en la principo 2. Kion kovras la vorto: *speciala*? (a) supernacia, (b) ĝis maksimumo regula, (c) ne tre disvastiĝinta. Oni povus, kompreneble, daŭrigi la specialajn ecojn de esperanto, sed la supraj tri kvalitoj sufiĉas por klare ekspliki la specifan rolon de nia revueto.

A. Didaktike redaktata lerneja esperanto-periodaĵo nepre devas esti *internacia*, eĉ se kelkaj Landaj Asocioj jam havas forton finance subteni tian. Kial?

1. Naci-karakterata eldonaĵo degradas la Internacian Lingvon, t.e. preterlasas ties esencan kvaliton. En nacia medio esperanto senvole havas karakteron de snobismo.

2. Ĉar la legantaro kvazaŭ ordone postulas tion. La junularo lernas esperanton ĝuste por profiti el la internacieco de la lingvo.

3. Ĉar nun, kaj ŝajne dum ankoraŭ kelka tempo, nia financa stato ne permesas eldoni apartan nacian lernejan revuon.

4. Nur internacia periodaĵo ebligas kunigi nian forton kaj certigi relative altan nivelon.

Internacieco devas manifestiĝi ne nur en la disvastigado, sed ĉefe en la konsisto de la redakcio. Kaj ĝuste ĉi-rilate esperanto havas grandan avantaĝon antaŭ naciaj periodaĵoj, kiuj vole-nevole misprezantas la mondon, tro emfazante la signifon de tiu aŭ alia ŝtato, lingvo kaj kulturo; male, esperanto povas liveri pli-malpli ĝustan superrigardon.

B. Krom lingva kaj kultura celoj nia periodaĵo havas unu plian karakteron, nome: la esperanto-lingvuloj, precipe lernejoj, estas forte izolitaj. La infanoj havas nur unu internacian organizaĵon neŭtralan (Kastora Klubo de Esperanto) ne laŭmerite subtenatan. Sekve, se ni volas ekspluati la humanismajn kvalitojn, la tutan edukon valoron de esperanto, ni ne povas preteriri organizajn demandojn. Necesas unuigi la lernejarojn, firmigi en ili la senton de solidareco, aktivigi ilin por komunaj celoj; t.e. gvidi ilin laŭ difinita vojo al niaj organizaĵoj.

En la supraj vortoj verŝajne evidentiĝas la signifo de nia internacia revueto. Ni devas atingi, ke ĝia kvalita supereco estu ĝenerale agnoskata kaj ekspluatata. Por tio ni petas ĉiujn legantojn pri aktiva partopreno en ĝia redaktado kaj propagandado.

Géza Kurucz, Hungarujo

La erarvoj de IPR

Post la renaskiĝo de IPR multaj abonantoj, legantoj kaj kolektantoj ne povis plene sekvi ĝian eldonritmon. Pro tio ni listigas ĉi tie la aperintajn numerojn:

Jarkolekto 1 (1970/71): N-roj 0 (Provnumero), 1 (Okt.), 2 (Marto)

Jarkolekto 2 (1971): N-ro 1 (Pli ne aperis.)

Jarkolekto 3 (1972): N-ro 1 (Pli ne aperis.)

Speciala eld. N-ro 1 (1973). (Enhavo: István Szerdahelyi: La lerneja instruado de la Internacia Lingvo. Enkonduko en instrumentodon. 30 p.)

Tiuj kalendaroj aperis en eldonejo Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, kaj estas tie mendeblaj.

Jarkolekto 4 (1973/74): Varbnumero (Nov. 1973), N-ro 1 (Jan. 1974).

Tiuj kaj la sekvantaj kalendaroj estas eldonataj de ILEI kaj mendeblaj ĉe la komisiitino por IPR, S-ino Karin Ruff, Hauptstr. 189, D-3151 Rosenthal.

R. H.

Nova, alloga legolibro por komencantoj

Lienhardt, Albert: *Amuzaj dialogoj en Esperanto por faciligi al novuloj paroli la internacian lingvon.* (Rotterdam): UEA 1973. 141 p.

En novembro 1973 aperis la libro *Amuzaj dialogoj*, verkita en simpla lingvo-stilo por faciligi al novaj lernantoj lerni paroli la Internacian Lingvon.

Tiu novspeca legolibro enhavas 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, kutimaj parol-turnoj, demandoj kaj respondoj, kiuj ebligas al lernantoj kaj progresemluloj ekzercadi sin en la parola uzo de Esperanto. Dudek tutaĵaj humuraj desegnaĵoj ilustras la dialogojn kaj prezentas plian valoran materialon por demandoj kaj respondoj en la kurso.

Precipe grava estas la laŭgrada aranĝo de la dialogoj, kiu permesas al la lernantoj progresi de tre simplaj tekstoj al la nivelo de normala konversacia lingvaĵo. En la klariga antaŭparolo troviĝas ankaŭ valoraj konsiloj por la kursgvidantoj.

Tiu amuzaj kaj instrua legolibro estas bele presita sur luksa papero kaj fortike broŝurita en oportuna poŝformato. La litertipo estas oportune granda.

Kompendio por komencantoj

Quarello, Daniel: *Síntesis de Esperanto para principiantes.* 2. eld. Buenos Aires: Quarello (1962). 118 p.

La dirita lernolibro en hispana lingvo estas la dua volumo de kvarvoluma serio, kiu laŭ la ideo de ĝia argentina aŭtoro, povus servi kiel bazo por la konoj pri Esperantaj historio, lingvo kaj literaturo. La kvar partoj estas:

- a) mallonga historio de Eo en hispana lingvo
- b) la nuna libro
- c) lernolibro por progresintoj
- ĉ) libro servanta al la klerigado de Eo-instruistoj.

Síntesis de Esperanto para principiantes estas destinita, kiel diras la titolo, por komencantoj. Ĝi volas enkonduki en la gramatikon kaj vortrezoron de la lingvo.

La aŭtoro komencas de la fonetiko de Eo. La sonoj de Eo estas klarigataj per analogaj sonoj de la hispana, ĉe kio la argentina prononcovarianto servas kiel bazo. Ĉe sonoj, ne ekzistantaj en la hispana, la aŭtoro altiras francajn vortojn.

Enkondukante en la vortrezoron kaj la gramatikon de Eo la aŭtoro procedas tre singarde, prezentante ekz. la gramatikon en plej malgrandaj unuoj, ilustrante la prezentitan unuon per du-tri ekzemploj kaj ekzercigas en sekvanta ekzerco kun la antaŭe enkondukitaj vortoj. Tiamaniere enkondukiĝas la tuta vortfarado, sintakso kaj fonetiko kaj vortaro de ĉ. 750 elementoj. En la lastaj 30 paĝoj de la libro la tuta gramatika materio estas resumita en la 16 reguloj de Zamenhof kaj la vortaro, konjunkcioj, pre- kaj sufiksoj estas kompilitaj en alfabeto vico en apartaj listoj, tiel ke la libron oni povas uzi tre bone kiel kompendion por komencantoj.

Tamen, la didaktiko kaj metodiko rekomendataj de la aŭtoro, estas eksmodaj. Same kiel estas sensence lerni parkere kaj memoradi la vortlistojn,

kiel Quarello emfazas al siaj lernantoj, tiel same estas ne rekomendinde sekvi lian ekzemplon tradukante laŭvorte en la hispanan kaj retraduki, kiel li plurfoje praktikas.

Malatentante tiujn didaktikajn kaj metodikajn erarojn, oni povas paroli pri sukcesa provo liveri al la komencanto ne nur sintezon de la vorttrezoro kaj gramatikaj reguloj, sed enrigardi lin en la sintezon de Eo entute, kie kunfandiĝas lingvaj kaj ideologiaj elementoj.

Hugo Greff, FRG

Pli pretendemaj ekzercoj

Quarello, Daniel: *Compendio de Esperanto para adelantados*. Buenos Aires: Quarello (1972). 193 p.

Tiu ĉi kompendio por progresintoj estas la 3a volumo de la Quarello-metodo, de "organika kaj progresema metodo" por enkonduko en Esperanton.

Kiel skribite sur la kovrilpaĝo, tiu ĉi libro volas esti lernolibro por progresintoj, sed ankaŭ komencantojn ĝi celas "kiuj efike volas lerni la lingvon por ĉouj". Simile al *Sintesis* ankaŭ *Compendio* enkondukas en la leksikonon kaj gramatikon de Esperanto, tiel ke tiu ĉi volumo de la quarello-metodo multe paŝe ŝajnas esti ripeto de vol. 2. Tamen la ekzercoj estas rilate la enhavon pli pretendemaj. Tio kio superas *Sintesis*, estas la legaĵoj de la libro. Tiuj iomete modifitaj eltiraĵoj el la originala literaturo de Esperanto povas doni al la lernanto impresoplenan enrigardon en la imagomondon de la Esperantomovado. Inter tiuj tekstoj elstaran lokon okupas tiuj de kaj tiuj dediĉitaj al Zamenhof. Paranteze, la kreinto de Esperanto estas kultata ĉi-libre preskaŭ kiel kanonizita sanktulo. ("Zamenhof estas ekzemplo de vera, profunde sincera homoco. Lia tuta vivo estis dediĉita al la Homaro ĝis forgeso de si mem." p. 188).

Metodike kaj didaktike tiu ĉi libro alportas nenion novan. Pri la metodo de tiu ĉi argentina lernolibro ni povas diri la samon kiel pri *Sintesis*. Komparante ambaŭ librojn oni povas konstati, ke vol. 2 preskaŭ komplete inkluziviĝas en vol. 3, kiu ŝajnas al mi reviziita kaj ampleksigita eldono de vol. 2. Krom la vortaro refoje resumita fine de vol. 2, en tiu ĉi 3a volumo nenio el *Sintesis* mankas, kio ne estas prezentita en pli altkvalita formo. Eĉ la eksterajo, la preso, la papero konsiderinde pliboniĝis kompare kun vol. 2. Tiel oni povas diri, ke *Compendio* plenumas preskaŭ ĉion kion ĝi promesas. Ĝi estas kompendio donanta sur 190 paĝoj enrigardon en la lingvon, historion kaj ideologion de Esperanto; ĝi estas lernolibro, kiu por komencantoj (!) miaopinie pli taŭgas ol *Sintesis*, eĉ se, malgraŭ ĝia titolo, ĝi malpli taŭgas por progresintoj, ĉar ĝi enhavas tro da materio konuta de progresintoj.

Hugo Greff, FRG

Serioze kritikindaj eroj

Quarello, Daniel: *Perfektiga Kurso. Plena Traktato pri la Sintakso*. (2 eld.) Buenos Aires: Quarello (1973). 191 p.

Quarello ofertas en sia *Perfektiga Kurso* tre ampleksan materialon pri la sintakso de Esperanto, kiun li priskribas – laŭ propra eldiro – per la moderna lingvistika terminologio. Tion oni nepre povas kontesti, bedaŭrante, ke la aŭtoro ne aplikis vere modernan sistemon por la prezentado de la gramatika strukturo de Esperanto, kio ja estus postulinta kompletan reverkadon de la libro. Quarello mem asertas, ke Esperanto estas plej facila lingvo, sed studente

lian verkon, oni ekhavas la impreson, ke lia priskriba maniero eĉ nenecese plikomplikigas tiun facilan gramatikon. Tre nebulaj ŝajnas asertoj, kiel tiu, ke en predikato el finitiva kaj infinitiva verboformoj "la infinitivo kompletigas la signifon de la finitivo". Aŭ, ĉu estas klarige, nomi la akuzativon "paciento de la predikato"?

La priskribo de la kazoj (lige kun la komplementoj) okazas nek laŭ nura surfacostruktura nek laŭ profundostruktura modelo, sed laŭ iu miksa sistemo. Dum la funkciojn de liberaj komplementoj Quarello prezentas semantike-profundostrukture, li distingas ĉe la necesaj komplementoj inter subjekto kaj agantivo. Ĉi tie la agantivo estas la surfaca kazo por la originala subjekto de pasivigita propozicio ("la gazeto estas legata de mi").

La specifaj komplementoj ("oni elektis lin *prezidanto* – . . . *kiel prezidanton*"), ĉiam tikla gramatika problemo ĉe tre multaj esperantistoj, estas bone eksplikitaj. Instruaj estas ankaŭ la paragrafoj pri subjektaj kaj objektaj propozicioj kaj pri infinitivoj dependaj de substantivoj kaj adjektivoj.

La atenta leganto certe ne povas aprobi ĉiujn elmetitajn tezojn. La aŭtoro asertas interalie, ke adverbo povas esti subjekto de propozicio ("pruvekzemplo": *hierau estis festo*) kaj kredigas eĉ, ke prepozicioj uzigas subjekte ("pruvekzemplo": "*al*" estas *prepozicio*). Evidente en la lasta ekzemplofrazo temas nur pri metalingva uzo.

Ankaŭ pri la disdivido de la vortoklasoj oni devas kelkfoje malkonsenti: ĉu "ambaŭ" estas adverbo? Ĉu "adiaŭ", "jes" aŭ "jen" estas klasifeblaj kiel adverboj? Ĉe unu loko Quarello nomas "nek" adverbo, dum poste (ĝuste) konjunkcio.

Sub la paragrafoj pri liberaj predikataj komplementoj ekaperas ekzemploj, kiel "ne mi manĝis", kie "ne" evidente apartenas al "mi", sed ne al la predikato. Tio verŝajne eĉ ne estas eraro de la verkinto, sed ŝuldiĝas al sentebla manko de la libro, nome al malklara aranĝo kaj disdivido laŭ ĉapitroj kaj paragrafoj. Oportuna estas la abundo de ekzemploj, donitaj en ĉiu paragrafo. La valoro de la ekzemplofrazoj bedaŭrinde reduktiĝas pro ilia stila rigideco kaj sterila teorienco. Ekzemple, al la demando "kia estas Alberto?" Quarello ofertas la respondon "Alberto estas batanta", kio estas rekta mistrifto ŝuldata de formaleca dedukto el la koincido de la finaĵoj de "kia" kaj "batanta". Alia ekzemplo de teoriemo estas la pritrakto de kondicionalaj participoj ("amunta", "amuta"), kvazaŭ ili uzigus tute normale en Esperanto. – Oni povus ankoraŭ plilongigi la liston de tute eksterpraktikaj gramatikaj fenomenoj, proponitaj de Quarello, sed ĝis nun ne realigitaj en la Esperanta literaturo.

La prezentita libro certe havas siajn meritojn, sed serioze kritikindaj estas tamen kelkaj eroj. La aranĝo de la ĉapitroj kelkfoje embarasas pro ilia neklara dislimiteco, kaj la lingvaĵo de la ekzemploj estas ofte tre skemeca. Kiu ne konas verkojn de eminentaj Esperantaj literaturistoj verŝajne mistaksos – surbaze de tiu ĉi libro – la taŭgecon de Esperanto kaj en la ĉiutaga kaj en la belliteratura uzo. La libro povas taŭgi nur en kursoj gvidataj de kompetentaj instruistoj.

Heinz Dieter Maas, FRG

Ne avangarda, sed solida

Hans Grewel: *Didaktische Grundlegung und Modelle für einen zeitgemässen Religionsunterricht*. (Didaktika bazo kaj modeloj por moderna religia instruado.) Dortmund: Crüwell (1972). IX, 215 p. 18,- DM.

En la konfuza abundo de la religiopedagogia merkato tiu ĉi verko signas ripozan punkton. Konante la ofertojn, poziciojn kaj pretendojn de tiu merk-

ato la aŭtoro konscie limiĝas al la demando de la rolo de la etiko en la RI, kies pozicion en la lernejo li difinas el instruhistoria, teologia kaj didaktika bazoj konkretigante ĝin poste en kvar instrumodeloj.

Historia bazo. — Superrigardante unu jarcenton de religiopedagogiaj konceptoj Grewel konstatas, ke precipe post 1945 — kiel (tro) malfrua reago je la faŝisma totalismo — la religiopedagogio tro koncentris sin je biblio (eĉ plipezigitaj en la posta hermeneŭtika fazo), katekismo, kantaro kaj eklezia historio, kio kondukis al la miskonkludo, ke la kristanismo elĉerpiĝas en bibliismo kaj ke aktualaĵoj estas senrilataj al ĝi. Li rifuzas tiun biblian ĉirkaŭvojon por alveni ĉe la situacio de la lernantoj kun ilia fasko da etikaj demandoj. Tiu rekono signas la novan RI.

Etika bazo. — Elirante de la haoseco kaj pridubateco de nocioj kiel moro, moralo kaj etikeco Grewel enordigas ilin en la sistemo de etiko stariganta al si la demandon pri la ĝusta mezuro de nia agado kaj havanta kiel objekton la sumon de niaj vivesperoj (eksteraj agadoj kaj mensaj fenomenoj). Dislimigante la tri nociojn oni venas al la klasika dupartigo de socia kaj individua etikoj kiu lasta enhavas la problemecon de la memrespondo kaj ĝeneraliĝo ĝis plena formaliĝo (kiam la rilatopunkto estas la homa racio (en la senco de Kant) anstataŭ fenomenologie akirita minimuma etiko). La aktuala teologia problemo kondukas la aŭtoron al jenaj analizaj konstatoj: la malnovtestamenta unueco de kredo kaj ago (esprimiganta en interliga fideleco kaj obeemo, do en etikaj kategorioj) komencas disfali, kiam la kristana misio necese devas pli akcenti la “preni kiel veron”. La frukristana agado ankoraŭ prezentis interplektiĝon de kredo kaj socia kaj monda rilato, dum poste kredo rigidiĝis je ortodokseco, tiel ke hodiaŭ la kristaneco en demandoj kaj problemoj de nia aktuala homeco estas apenaŭ dokumentebla.

Laŭ Paŭlo la unuopa kristano havas potencon decidi pri sia propra agado, kiu trovas limigon nur en la konsiderado “de la frato”. Kristana etiko resumigas en la demando pri la kristana kontribuo al la humaniĝo de la mondo kaj trovas konkretigon en la jenaj postuloj: amo al la proksimumo (anstataŭ profitorientiĝo); graveco de la homo antaŭ aparatoj kaj regularoj (netuŝebleco de la individuo); nefiksateco de homo pro lia pasinteco (ekz.: la doganistoj).

Didaktika bazo. — En la dua parto Grewel skizas konturojn de lernejo-teorie pravigebla RI en kiu li prezentas postulatojn intertempe vaste konsentataj de la religiopedagogio. Aplikante tiujn konsiderojn al la etika instruado Grewel postulas la eliron de infanaj vivospertoj kaj ne la konstruon de religia ŝtof-bazo. Tio ofte postulas kooperan instruadon. Grava didaktika problemo estas tiu de la lernceloj en tiel konceptata RI, ĉar evidente alstrebindaj celoj kiel akiro de toleremo estas apenaŭ mezureblaj. Sama problemo resots la vasta spektro de eblaj temoj kaj ilia konstruo de malsupre supren. Fina problemo estas tiu de adekvata kombino de bibliaj kaj aktualaj etikaj demandoj. Eblan sintezon montras la projekto de instruplano por la 1a ĝis 10a lernojaroj.

Didaktika plenumo. — La lasta konkretiga parto prezentas kvar instrumodelojn: 1. La bildo de la homo en la reklamo (7./8. klaso); 2. strukturoj de la kunvivado en la socio: toleremo kaj solidareco (7./10. klaso); 3. roladoj en la seksa sinteno de gejunuloj (7./10. klaso); 4. ekzemploj por la problemo de la komunikado.

Tiuj modeloj, destinitaj kiel sugestoj por la lerneja praktiko, orientiĝas je la kriterioj de la curriculum-scienco: ili pravigas la temon, fiksas celojn, komentas la organizon de la instruado, prezentas materialojn kaj fine detaligas la unuopajn lecionojn.

Similaj solidaj verkoj — kiuj prezentas salutindan kombinson de interdependaj teorio kaj praktiko — estas dezirindaj ankaŭ por aliaj fakoj.

Reinhard Haupenthal, FRG

Ne malhavebla laborilo

Bibliographie Deutschunterricht. Ein Auswahlverzeichnis. Paderborn: Schöningh (1973). 222 p. (Uni-Taschenbücher. 230.) 9,80 DM.

La fakto, ke la germana gepatralingva instruado (GI) iom post iom ĉesas esti rigardata kiel apendico de la universitata germanistiko, konfirmiĝas en la kreskanta signifo i.a. de la literaturdidaktiko. Ĝin spegulas ankaŭ tiu ĉi bibliografio, kiu bilancas la rikolton de la jaroj 1965–1972, kiuj ekflorigis ampleksan literaturon.

La verko dividiĝas en 11 sekciojn: 1. bibliografioj, kompendioj, periodaĵoj; 2. bazoj de la GI; 3. (ĝeneralaj); 4. amas-medioj; 5. lingvoinstruado; 6. parol-edukado; 7. skribinstruado; 8. ortografia instruado; 9. stilistiko; 10. leg-instruado; 11. literatura instruado (la plej ampleksa ĉapitro).

La verko montras la ĝisnunajn fokusojn de la publikado kaj samtempe la direkton en kiun devas antaŭeniri novaj esploroj (ekz. ligi la literaturan instruadon al la esplor-rezultoj de la curriculum-teorio kaj de la sociaj sciencoj; daŭrigi la analizon de instruplanoj ktp.).

Aparta avantaĝo estas, ke verkoj kun enkonduka kaj orientiga karaktero estas aparte signifaj. Kune kun la bibliografio de verk-interpretoj de Schepper (1970 k.a.) tiu ĉi verko prezentas ne malhaveblan laborilon por la instruisto kiu ne volas stupidiĝi en la instrutroto kaj por la teoriulo.

Reinhard Haupenthal, FRG

Kelkaj francismoj estas forigendaj

Thierry, Jean: *L'Espéranto sans peine.* Paris: Assimil (1973), IX, 420p.

Laŭ nova prospekto de *Assimil* francoj povas lerni per ĉi tiu speciala metodo 11 lingvojn, germanoj 8, angleparolantoj 5, italoj 5, nederlandanoj 5, hispanoj 4, portugaloj 3, serboj kaj kroatoj 5, makedonoj 3, slovenoj 2, grekoj kaj turkoj nur la germanan. Entute estas oferto de 12 lingvoj: angla, franca, Esperanto, germana, greka, hispana, itala, latina, nederlanda, portugala, rusa kaj serbokroata. Diskoj, magnetofonaj bendoj, standardaj kasetoj kaj parte jam AAC-kasetoj (por aŭdaktiva-kompara metodo per malgrandaj lingvolaboratorioj) estas same uzeblaj por parolantoj de ĉiuj menciitaj lingvoj. Sufiĉe internacia metodo do, kiun mi jam utiligas de 25 jaroj. Se oni aldonas al tio, ke ekzemple en FRG pluraj radiostacioj elsendis kursojn per ĉi tiu metodo pri la franca, angla, itala kaj rusa, la aldonado de Esperanto povas esti nur avantaĝo. Momente laŭ informoj ricevitaĵ jam interesiĝas la germana, brazila, serbokroata branĉoj pri propra eldono kaj ankaŭ estas intereso en Japanujo.

La metodo *Assimil* ne estas metodo por ĉiuj adresatoj komencantaj, sed nepre ĝi povas fariĝi dua metodo por multaj esperantistoj, kiuj per la unua ne ellernis la lingvon, restas tro multe en la elementa esprimado kaj sub influo de la propra lingvo kaj speciale sub influo de nacilingva prononco. Por memlernantoj, kiuj tamen lernu laŭ la indikita ritmo per ondoj pasiva kaj aktiva, por vesperaj kursoj kaj ankaŭ por radiokursoj laŭ la menciita ekzemplo ĝi ŝajnas esti tre taŭga por kiel eble plej granda adresataro.

Per la 98 grandparte dialogaj lecionoj estas prezentata lingvaĵo sub rekta kontrolo de la Prezidanto de la Akademio. Ĝi intencas eluzi ĉiujn eblecojn, kiujn disponigas Esperanto. Tio rilatas al vortprovizo kaj frazeologio.

Agrable estas rimarkigi, ke ne nur en la deksesma leciono *Bukedo da proverboj* Jean Thierry provas alproksimigi lerte la proverbaron al la studentaro: la tre esprimiva *lele, iome, duone malbone* kaj multaj aliaj proverboj estos do konataj al venontaj uzantoj de la lingvo. Kiel ĉe ĉiuj aliaj *Assimil*-metodoj por ĉiuj tekstoj estas donitaj tradukoj franclingvaj, krom tio mallongaj gramatikaj klarigoj kaj ekzercoj, prononcindikoj en la komenco, bedaŭrinde ne laŭ internacia fonetika alfabeto, simile al la aliaj kursoj. Pro la diferencaj strukturoj de ambaŭ lingvoj la tradukado prezentas malfacilaĵojn por esti klariga. Kiel kutime ĉe *Assimil* ankaŭ Jean Thierry prezentas per sistemo de diversaj kampoj tradukhelpojn laŭvortajn.

Kiel jam menciite komence, ĉiuj lecionoj estas akompanataj per sonmaterialo escepte de la sepaj, kiuj donas gramatikajn reviziojn kaj notojn. La rolantaj de la internacia medio esperantoparolanta streĉas prezenti per tre instruaj dialogoj, leteroj kaj aliaj eblecoj tre vastan gamon da temoj, de gramatiko tra scienco, geografio, historio, turismo ĝis lingvopolitiko sufiĉe neŭtralan elparolon, en kiu la naciaj trajtoj ne estas tro markitaj kaj la personaj formantoj bone rimarkeblaj. Por tute neŭtrale prijuĝi oni ne devus koni persone la parolantojn kaj ties lingvoapartenon.

Jean Thierry, Roger Bernard, John Wells kaj Carlo Minnaja estas ekde nun eblaj ĉiutagaj gastoj en espereble multaj domoj de Esperantolernantoj kaj -parolantoj, kiuj aldone al la parolantoj de la radioprogramoj esperantlingvaj certe konsiderinde povos plialtigi per la bona libro de Jean Thierry la lingvonivelon ĝenerale kaj speciale tiun de la prononcmankon.

Por tamen povi instrui ankoraŭ pli neŭtralan elparolon ĉe eventuala produktado de AAC-kasetoj oni devus elekti ankoraŭ pli neŭtralan parolanton, ĉar lingvolaboratoria ekzercado per tiaj kasetoj havas ja plej profundan efikon rilate la prononcmankon de la studentoj, momente kompreneble ĉefe francoj — sed des pli bone.

La kantojn oni miaopinie estus povinta prezenti en pli plaĉa formo. Kelkaj francismoj estas forigendaj en dua eldono. Ne plaĉas al mi la esprimo „rigardi la trian kanalon” por indiki programon de televida ĉeno, „kanalo” sur tiu kampo ja estas nur frekvencebendo de unuopa stacio. Indiko de konkretaj kongresoj, kiuj en la nuna momento estas aŭ estis aktualaj, povus malbone impresi post 10 jaroj, sed pri tiu starpunkto oni povas diskuti.

Libro kaj sonmaterialo do tre rekomendindaj por diversaj grupoj de komencantoj, por ĉiuj progresintoj, kiuj deziras serioze profundigi sisteme en la lingvon, precipe por Esperantoinstruistoj kaj aliaj instruantoj. Eldonoj en aliaj lingvoj varme rekomendataj.

Günther Becker, FRG

En la forgesujon de la libroŝrankoj

Rogers, Carl R: *Entwicklung der Persönlichkeit. Psychotherapie aus der Sicht eines Therapeuten.* (Evoluo de la personeco. Psikoterapio el la vidpunkto de terapeŭto.) Stuttgart: Klett (1973). 407 p.

La libro, kiu alvenis post 12 jaroj trans la Atlantiko, fine ĉe ni en germana traduko, entenas kolekton de prelegoj de la psikoterapiisto C.R. Rogers.

Kiu estas C.R. Rogers? Legante lian libron oni ekscias multon pri li, ne nur en la unua, sufiĉe ampleksa ĉapitro „Jen mi”, kie li felietone priskribas sian karieron kaj meritojn kiel psikoterapiisto, universitata profesoro, homo, edzo kaj patro, ĉiam laŭ la devizo, ke la plej personaj eldiroj estas la plej ĝeneralaj. Lia intenco en la profesia laboro estas helpi al la aliaj homoj fariĝi

la homoj, kiuj ili en vero estas, laŭ jena metodo: ĉiam montri kore varmajn emociojn, akcepti kaj estimi la alian, kaj vidi la mondon de la alia kvazaŭ per ties okuloj, tiam la alia fine komprenos sin mem, sentos integriĝon en la homa socio, kaj fariĝas la homo kiu li en vero estas kun pli da memstareco, unika personeco, pli akceptema kaj komprenema kontraŭ la kunhomoj kaj tiel majstros la problemojn de la vivo. Jen la vojo elkovita en propraj spertoj, ĉar — aliaj devizoj de la aŭtoro — nur ĝin fidu; la juĝoj de aliaj homoj nenion eldiras; la plej grava aŭtoritato estas la sperto. Tiun egocentrismon aŭtoran oni trovas ĉie en la libro, la teorioj ĉiam estas eksplikitaj per propraj spertoj en formoj de laŭvortaj intervjuopartoj, el la terapia praktikumado kun ĉiuj „m-hm-oj” de la terapiisto kaj la klientoj.

Resume oni do ekscias multon pri la spertoj kaj opinioj de la aŭtoro pri la proceso de personeco, pri ĝusta lernado kaj instruado (do, fake dirite, pri pedagogia psikologio), pri la homa kreativeco kaj aliaj sciindaĵoj. Bedaŭrinde la scienca kerno kaŝiĝas sub amaso de felietona babilado kiu kaŭzas la amplekson. La fina faka indekso promesas sciencecon, kontraŭe laŭ la enhavotabelo ne eblas formi al si bildon pri la vera enhavo. Bedaŭrinde la bibliografaj notoj ĉe la fino de ĉiu ĉapitro estas magraj kaj limiĝas al la ĉe ni apenaŭ konata kaj malhavebla usona literaturo. Des pli ampleksas la bibliografio de la verkoj de la multskribisto Rogers (11 p.).

Rekomendindas la libro por interesigantaj laikoj kiel legaĵo dum la bluaj horoj aŭ dum pluvaj feriaj tagoj, ĉar la libro disradias ĉiam kaj ĉie optimismon. Vidu alian devizon de la aŭtoro: „la faktoj estas afablaj” kaj „ĉiam mi spertis, ke la homoj funde ĉiam pozitive evoluas”. Kaj „la vivo en la plej bona kazo estas fluanta, ŝanĝiĝanta proceso”. Do la ĉiam fluantaj akvoj ankaŭ fluos trans tiun libron kaj portos ĝin en la forgesujon de la libroŝrankoj post la unua lego.

Irmtraud Haupenthal, FRG

Por amuza lernado

Ĝivoje, Marinko: *Esperantonimoj. Listo de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj kaj vortludoj.* Milano: La Patrolo (1973). 111p.

Legante la titolon de tu ĉi broŝuro, oni eble unue kredas pri preseraro (— ĉu ne devus esti Esperantonimoj?) kaj due ektimas, ke iu amatoro ne povis deteni sin de la kreado de iu nova lingvoteoria nocio por Esperanto. Sed, feliĉe, ambaŭ supozoj estas senbazaj: La nomo de la aŭtoro de tiu ĉi malgranda verko certigas, ke ne temas pri malseriozaĵoj.

La centpaĝa libreto estas sukcesa provo de enkonduko en la strukturon de la Esperanta vortotrezoro. Ĝi estas dividita laŭ kvin ĉapitroj, el kiuj la unua traktas la antonimojn, do vortojn kun kontraŭa aŭ mala signifo. En Esperanto ni formas tiujn antonimojn normale per la prefikso „mal-”, sed ofte ekzistas krom la „mal-” vorto ankaŭ simpla radiko. Dek-naŭ antonimajn parojn nekunmetitajn (kiel varma - frida) la aŭtoro listigas — niaopinie certe ekzistas multe pli, sed la kompila laboro ja iam devas komenciĝi.

La dua ĉapitro entenas homonimojn, do vortoformojn, kiuj havas plurajn tre malsamajn signifojn (ekz-e „boro” povas esti „borado” aŭ kemia elemento). El tiuj problemaj vortoj ĉirkaŭ dudeko estas listigita.

Multe pli ampleksa estas la ĉapitro dediĉita al paronimoj, kiujn oni difinas jenamaniere: Du vortoj estas paronimaj, se ili estas preskaŭ samprononcaj (ekz-e artikolo - artiklo). Listo de tiaj vortoj do havas lingvistikan gravecon (por konstati t.n. minimumajn parojn) kaj povas esti sukcese uzata en la lingvo-instruado.

En la kvara ĉapitro temas pri sinonimgrupoj, el kiuj la aŭtoro kompilis ĉirkaŭ kvarcent. La vortoj de ĉiu tia grupo inter si estas sinonimaj, do havas la saman aŭ preskaŭ saman signifon. Sub “facila” oni trovas ekz-e “leĝera” kaj “malpeza”, sub “perdi” troviĝas “malgajni” kaj “malprofiti” (Sed “gajni” kaj “profiti” ne aperas kiel antonimoj de “perdi”).

La lasta ĉapitro okupiĝas pri vortludoj, ekestantaj per malsamaj vorto-distranĉoj, ekz-e “rifuzo” povas esti komprenata kiel “rif-uz-o”, aŭ “domaĉeto” kiel “dom-aĉ-et-o” aŭ “dom-aĉet-o”. Da tiaj vortludoj la aŭtoro sciigas ĉirkaŭ 150, sed oni povas esti certa, ke oni povas trovi (eble komputere) multajn pliajn.

Konklude ni taksas la verketon kiel seriozan studon kaj rekomendas ĝin precipe por amuza lernado.

Heinz Dieter Maas, FRG

Okaze de la represo de du Kabe-verkoj

Sienkiewicz, H.: *La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj de polaj aŭtoroj*. Elektis kaj trad. Kazimierz Bein (Kabe). Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag 1973. 207p. 25 dkr.

Turgenev, I.S.: *Patroj kaj filoj*. El la rusa lingvo trad. Kazimierz Bein. 3. repr. (Aabyhøj): Dansk Esperanto-Forlag 1973. 251p. 25 dkr.

Kazimierz Bein (1872-1959) apartenas al la plej misteraj adeptoj de Esperanto. Lia kariero en Esperantujo similas tiun de kometo. Lia aktiveco daŭris apenaŭ unu jardekon, sed postlasis neignoreblajn spurojn de ampleksega verkaro. Paralelon oni trovas verŝajne nur en la persono de Eugen Wüster.¹

En 1931 Kálmán Kalocsay rondelis pri li jene:

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe
Droninta vive en la morto,
Kia mister-malica forto
Vin povis de ni preni rabe?

Ni lernis de vi lernantknabe
Kuiiri en la stilretorto,
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe
Droninta vive en la morto!

Kaj nun ni miras gape, strabe
Pri via karier-aborto.
Al vi la Esperanta vorto
Nun sonas eble jam arabe...

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe!²

Evidente por Kalocsay elstaris du faktoj: la lingvomodelo kiun kreis Bein kaj la mistero kial li forlasis Esperanton.

En la sama jaro Jan Fethke vizitis Bein en Varsovio kaj publikigis sian interparolon kun li.³ El tiu intervjuo jenaj faktoj restas notindaj:

1) Kp. Hauptenthal, Reinhard: Eugen Wüster 75-jara. En: “Monata Cirkulero” (KCE) 1974: 57, p. 1-3.

2) En: “Rimportretoj. Galerio de Esperantaj steloj.” Budapeŝto 1931, n-ro XXVII.

3) Kion diris sinjoro Kabe? Intervjuo kun la plej fama Esperanta stilisto. En: Literatura Mondo 1. 1931: 7, p. 144-145. (La revuo estis ĵus fotorepresa en Japanujo.)

1. Bein forlasis Esperanton “ĉar laŭ lia opinio Esperanto ne progresas” (p. 144);
2. “La Esperantistoj ... ne scias sian lingvon.” (p. 145);
3. “Mi kredas ke la lingvo profitas pli multe per tradukado ol per libera originala verkado.”

La unuaj du konstatoj restis veraj, dum la tria validis en la tempo de la aktivado de Bein. Li restis konsekvenca kaj estas veraj, ke la lingvo profitis de liaj multaj tradukoj, kies ĉefajn ni listigas:

1904 *La fundo de l'mizero* (Sieroszweski)

1905 *La interrompita kanto* (Orzeszko)

1906 *Elektitaj fabeloj* (Grimm)

Pola Antologio

1907 *Internacia Krestomatia*

La faraono (Prus)

1908 *En fumejo de l'opio* (Reymont)

1909 *En malliberejo* (Ĉirikov)

Versaĵoj en prozo (Turgenev)

Patroj kaj filoj (Turgenev)

1910 *La lasta renkonto* (Reymont)

Vortaro de Esperanto

1912 *Mia poŝhorloĝo* (Konopnicka)

La verko *La lanternisto* kunigas la kolekton *Pola Antologio* (1906) kaj partojn el *Internacia Krestomatia* (1907) kaj aperis unuafoje en 1940 kiel editoraĵo de Federacio de Laboristaj Esperantistoj (FLE) en Amsterdamo. Bedaŭrinde FLE atencis la lingvaĵon de Bein kaj kvankam ĝi notas la ŝanĝojn en la fino de la verko, ĝi erarigas la leganton rilate la partecan uzadon de Bein. En la sola titola rakonto (p. 7-24) mi trovis jenajn fuŝformojn: “vi estos eksigata” (p. 10), “li estis liberigata de kanadaj pafistoj” (p. 11); “alie vi estus juĝata” (p. 23), kie la originalo konas nur la -ita-formojn.

La eldonisto farintus pli bone, se li estus kuniginta ambaŭ fontojn en ilia tuteco kaj laŭ la originalaj eldonoj.

La sama kritiko validas ankaŭ por *Patroj kaj filoj* kiu estis same represita laŭ la FLE-eldono, kiu ja tipografie superas la moskvan eldonon de 1909, sed kiu ne liveras al ni la aŭtentan tekston de Kabe.

Per tiaj kaj similaj reeldonoj du admonoj estu atentataj de la eldonistoj:

1. oni retroiru al la originala (aŭtenta) teksto;
2. se eble, oni aldonu eseeton, kiu studas la lingvan kaj stilan valoron de la verko. La hodiaŭa leganto bezonas tian literatur-kaj lingvohistorian orientilon.

Malgraŭ tiuj malatentoj la eldonejo estas dankinda pro sia klopodo rehavigi al ni du klasikaĵojn de Esperanto. Estus dezirinde, ke reeldonoj de aliaj verkoj de Kabe okazu baldaŭ laŭ la diritaj principoj.

Reinhard Hauptenthal

Ni ricevis . . .

Buschbeck, Bernhard; Buttler, Gottfried: *Lernziele und Lernfreiheit. Folgen der Curriculum-Diskussion für die religionspädagogische Ausbildung.* (Lernceloj kaj lernlibereco. Konsekvencoj de la curriculum-diskutado por la religiopedagogia klerigado.) Stuttgart: Calwer Verl.; München; Kösel-Verl. (1973). 136 p. 14,80 DM. (Recenzo sekvos.)

Frank, Horst Joachim: *Geschichte des Deutschunterrichts. Von den Anfängen bis 1945.* (Historio de la germana instruado. De la komenco ĝis 1945.) (München): Hanser (1973). 996 p. 98,- DM (Recenzo sekvos.)

Röckel, Gerhard: *Die Arbeit mit Texten im Religionsunterricht. Methoden – Arbeitsmodelle – Beispiele.* (La laboro je tekstoj en la religia instruado.

Metodoj – labormodeloj – ekzemploj.) (Stuttgart): Calwer Verl., (München): Kösel-Verl. (1973). 205 p. (Religionspädagogische Praxis. RPP 10.) 25,- DM (Recenzo sekvos.)

Hessische Rahmenrichtlinien Deutsch. Analyse und Dokumentation eines bildungspolitischen Konflikts. (Heslandaj kadraj instrukcioj germana instruado. Analizo kaj dokumentado pri klerigopolitika konflikto.) (Düsseldorf): Bertelsmann Universitätsverl. (1974). 229 p. 12,80 DM. (Recenzo sekvos.)

Dithmar, Reinhard (ed.): *Literaturunterricht in der Diskussion.* Vol. II. Kronberg: Scriptor 1974. 320 p. (Scriptor Taschenbuch. 33.) 14,80 DM (Recenzo sekvos.)

Kaiser, Herbert: *Materialien zur Theorie der Literaturdidaktik. Quellen- und Arbeitstexte mit einer kommentierenden Einleitung.* München: Fink 1973. 361 p. 19,80 DM (Recenzo sekvos.)

Waldmann, Günter: *Theorie und Didaktik der Trivialliteratur. Modellanalysen – Didaktikdiskussion – literarische Wertung.* München: Fink 1973. 196 p. (Kritische Information. 13.) 12,80 DM (Recenzo sekvos.)

Internacia Ligo De Esperanto-Instruistoj

Estraro de la Ligo

- 1) Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- 2) Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo)
- 3) Sekretario: D-ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- 4) Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- 5) Kasisto: S-ro Olle Olssen, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo)

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio: Ivan T.M. Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria
Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6 -18/8/13, A-1030 Wien
Belgujo: G. Pirlot, Torhoutsteenweg 17, B-8400 Oostende
Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP
- Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danlando: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
Germanujo: Hermann Behrmann, Bahnhofsstr. 54, D-4972 Löhne 1
Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno
Hispanujo: Felipe Gonzales Del Pino, Dona Maria de Molina 15c, Sevilla
- Hungarujo: Marta Cser, Zelay út. 10-14, H-1368 Budapest V
Israelo: Ron Aser, Raanana, Aser 5
Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
Jugoslavio: Miodrag Stojanovič, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
- Kanado: George Du Temple: 930 Ardmere Drive, R.R.2, Sydney, B.C.
- Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl-1719
Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
Nov-Zelando: F. Fleming, P.O. Box 5042, Wellington
Pollando: Teresa Nemere, str. J. Olbacht 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
Suda Koreujo: Dae Young-Rhie, 204-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
- Svedujo: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, S-421 74 Västra Frölunda
Svisujo: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco
Usono: Dorotea Holland, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara, Ca 93111

IPR – Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR- ebligi abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn- kreado de infanliteraturo- verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71. 464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.